

# Informilo de Marto 2019

Numero 39, marto 2019

## Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo



### Universala Esperanto-Asocio

La Studo-Grupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj invitas vin al Simpozio pri **Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo**, jaŭdon kaj vendredon, 9-10 majo 2019, ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, USA (Unua Avenuo ĉe 44-a Strato

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estis subskribita en Sanfrancisko la 26-an de junio, 1945, kaj ekvalidis la 24-an de oktobro tiujare. Sekve, Unuiĝintaj Nacioj festos sian 75-an datrevenon en la jaro 2020. Tra la pasintaj 74 jaroj, Unuiĝintaj Nacioj laboris por (laŭ la vortoj de la Ĉarto) “savi estontajn generaciojn de la plago de milito,” “rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj,” kaj “antaŭenigi socian progreson.”

Mallonge dirite, ĝi kreis kadron de internacia interkonsentado kaj kunlaboro, kiu, kvankam fragila kaj ofte minacata, daŭras jam tri generaciojn. Kion oni povas fari por sekurigi ĝian estontecon?

Laŭ Artikolo 1(3) de la Ĉarto, inter la celoj de Unuiĝintaj Nacioj estas “realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

La nuna simpozio dediĉos apartan atenton al la lingva demando. Kvankam UN jam ĉiam favoras dialogon, en lastaj jaroj ĝi fariĝis pli sentema pri la bezono de dialoga egaleco. Alivorte dirite, ĝi fariĝis ĉim pli sentema pri la neceso aŭskulti siajn publikojn anstataŭ simple paroladi al ili, kaj ne nur kompreni sed ankaŭ esti komprenata. Tiaj konceptoj fundamentas la Celojn por Daŭripova Evoluigo akceptitajn en la jaro 2015 kaj fiksintajn la tagordon de UN dum ĝia alproksimiĝo al sia centjariĝo. En mondo kie oni parolas milojn da lingvoj, ĉu UN pretas por egaleca dialogo, nun kaj estontece? Se ne, kion fari por krei lingvan pretecon – same en la interna funkciado de la organizaĵo kaj en ĝiaj rilatoj kun la pli vasta mondo? Tiuj demandoj estas aparte aktualaj en la jaro 2019, la Internacia Jaro de UN pri Indiĝenaj Lingvoj. Ĉefaj parolantoj ĉe la simpozio estos: **Joseph Lo Bianco**. Profesoro pri Lingva kaj Alfabetiga Edukado, Universitato de Melburno, Aŭstralio; antaŭa prezidanto de la Aŭstralia Akademio de Humanistiko. Kiel specialisto pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado, en la jaro 2012 li konceptis, gvidis kaj realigis kvarjaran, trilandan iniciaton pri lingvo kaj pacokonstruado en Malajzio, Mianmaro kaj Tajlando. Li multe verkis pri dulingva edukado, pacokonstruado kaj komunikado, multkulturismo kaj interkultura edukado, kaj la revivigo de indiĝenaj lingvoj kaj lingvoj de migrokomunumoj.

**Narjess Saidane**. Ambasadorino Saidane fariĝis Konstanta Observanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Organizaĵo por Frankofonio en 2017. Antaŭe (2013-17) ŝi laboris por UNDP (la evoluiga programo de UN) en ties Programo de Helpeco al la Palestina Popolo, laborante tie de 2013 ĝis 2017 kiel Vica Speciala Reprezentanto de la Administranto, en Jerusalemo. Inter antaŭaj roloj estis Vica Surloka Reprezentanto por la komuna oficejo de UNDP, la Fonduso de UN pri Demografio (UNFPA) kaj la Infana Fonduso de UN (UNICEF) en Kabo Verda, kaj similaj roloj en Maŭritanio kaj en sia denaska Tunizio.

**Iris Orriss**. Iris Orriss rolas kiel Direktoro de Internaciigo ĉe Facebook. Ŝi laboras ĉe Facebook de post januaro 2013 kaj pasie laboras por forigi la lingvan baron ĉe Interreto. Ŝia laboro rilatas al kreskigo de Facebook en internaciaj merkatoj. Krome, ŝi estas estrarano de Tradukistoj sen Limoj, senprofitcela organizaĵo kiu specialistas pri livero de esencaj informoj en la ĝusta lingvo ĝustatempe. Antaŭ sia alveno al Facebook, ŝi estis direktoro ĉe Microsoft, kie ŝi okupiĝis pri internaciigo de produktoj kaj evoluigaj procedoj en la entreprena kaj lingvoteknologiaj departamentoj. Ŝi estas denaske germano kaj edukiĝis ĉe la Libera Universitato de Berlino.

Sponsoroj de la simpozio estas la Centro pri Aplika Lingvistiko, la Internacia Organizaĵo de la Frankofonio, ESF: Esperantic Studies Foundation, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kaj Universala Esperanto-Asocio.

La fina programo kaj detaloj pri aliĝo troveblas meze de marto 2019 ĉe [www.languageandtheun.org](http://www.languageandtheun.org).

## Esperanto en la Komitato de NROj pri Edukado, Lernado kaj Alfabetigo

La kunveno de februaro 2019 de la Komitato de NROj pri Edukado, Lernado kaj Alfabetigo, konstanta komitato de la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj (CoNGO), okazis la 21-an de februaro, Patrilingvan Tagon (vidu sube), kaj estis dediĉita al la demando de lingvoj. Okazis tri prezentaĵoj. Prof. Carol Benson kaj Erina Iwasaki, de Universitato Columbia, prezentis la rezultojn de sia pritakso de dulingva eduka programo en Senegalio; Marcie Craig Post, ĉefdirektorino de la Internacia Alfabetiga Asocio, priskribis la laboron de sia asocio; kaj Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN, priskribis la delongan ligan de UEA kun la laboro de Unuiĝintaj Nacioj.

UEA (klarigis Tonkin) havas longan historion kiel pledanto por homaj rajtoj – fakte ekde la kreado de la lingvo, L.L. Zamenhof, fine de la deknaŭa jarcento. Hodiaŭ, la lingvo “ludas gravan rolon en edukado. Ĝi estas efike uzata en klasĉambroj tra la mondo. En iuj klasĉambroj ĝi rolas kiel enkonduko al lingvostudado ĝenerale, ĉar ĝi estas relative facile lernebla kaj utiligebla. En aliaj klasĉambroj ĝi utiliĝas kiel

elemento en edukado al tutmonda civitaneco. Abundaj programoj pri tutmonda civitaneco dependas de la angla lingvo kiel medio, sed tio en si mem kreas neekvilbron. Esperanto povas eliri la anglalingvan bobelon por kontaktigi gejunulojn kiuj eble ne konas la anglan sed komencis studi Esperanton. Per Esperanto, ĉiu homo estas je sama nivelo kaj la egaleco kiu estas fundamenta al tutmonda civitaneco estas konservata kaj ekzempligata.”

La agado de UEA ĉe UN fokusiĝas precipe je levado de la kolektiva konscio pri la graveco de lingvoj. “La lingvo estas ĉe la koro de la agado de UN... Sed tio ne signifas, ke oni senpripense akceptu ĝin... Ni devas levi la konscion de ĉiuj homoj ĉe UN pri ĉiuj aspektoj de la lingvo.” Kiel unu inter malmultaj neregistaraj organizaĵoj kiuj rekte interesiĝas pri lingvoj, la unua tasko de UEA ĉe UN, d-ro Tonkin asertis, estas sentigi la organizaĵon pri la bezono de lingva egaleco kaj maksimuma lingva kompreno.

## **Universala Esperanto-Asocio: Mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de Internacia Patriningva Tago, 21 februaro 2019**

Okaze de Internacia Patriningva Tago 2019, UEA publikigis la jenan mesaĝon al UN kaj Unesko:

“La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo, plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo la bangla, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo “pli granda”, parolata de la fortuloj de la momento.

“Temas pri tio, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ekzemple rilate al la indiĝenaj lingvoj, sed ankaŭ rilate al aliaj “malfortaj” aŭ minoritataj lingvoj, kiuj rezulte ne aŭdiĝas en lernejoj, ne aperas en oficialaj randoj, ne estas partoj de la publika vivo, kaj perdas sian rekonon kaj prestiĝon. Tiel okazas iom post iom la malapero, morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian intelektan riĉecon: pri tio rimarkigis multaj lingvistoj, kaj en 2019 aparte atentigas UN kaj Unesko.

“Krom la socia maljusteco kaj psikologiaj problemoj rezultantaj el la perdo de uzeblo de sia gepatra lingvo, kaj pro nesufiĉa sperto en la uzo de la altrudata lingvo, necesas konscii ankaŭ pri aliaj realaĵoj: la biologia kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj necesaj ekzemple por daŭripova biodiverseco kaj por kultura kontinueco.

“En la jaro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la ĉiujara *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*. Ĝia unua kaj ĉefa celo estis ree emfazi la edukajn avantaĝojn de uzo de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe en elementaj lernejoj. Infanoj pli rapide lernas legi kaj skribi en lingvo kiun ili plene komprenas – aŭ, pli precize, ili suferas malavantaĝon se ili estas devigataj komenci sian lernadon per lingvo kiun ili parte, aŭ eĉ tute, ne komprenas.

“En sia mesaĝo al la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en 2018, Audrey Azoulay, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, deklaris: “*Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.*”

“Universala Esperanto-Asocio (UEA) gratulas Uneskon kaj UN pro ties kreskanta atento al lingva diverseco, sed emfazas, ke oni ankoraŭ ne dediĉas sufiĉan atenton al la demando de lingva justeco kaj lingva egaleco. Kiel unu el malmultaj neregistaraj organizaĵoj kiuj okupiĝas pri lingvaj demandoj, UEA instigas al Unesko kaj UN doni pli da atento al lingva justeco sur ĉiuj terenoj kaj tute aparte en edukado.

<http://www.esperantoporun.org/> <http://www.linguistic-rights.org/>

## **Mesaĝo de UEA okaze de Internacia Virina Tago, 8 marto 2019**

*Universala Esperanto-Asocio salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la Esperanto-komunumo, okaze de Internacia Virina Tago 2019. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo, Esperanto unike situas por ĉie helpi virinojn interkomunikiĝi trans la bariloj de distanco kaj lingvo, interŝanĝi vidpunktojn kaj ideojn, kaj organizi sin por agado favore al virinaj rajtoj.*

*Ni rekonas, ke multo farendas. Spite signifan progreson en Celo 4 de la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiu rilatas al edukado, virina edukado postrestas la viran. Al tro multaj infanoj mankas aliro al edukado, kaj tio precipe veras inter knabinoj. El inter tiuj infanoj kiuj havas aliron al edukado, tro multaj knabinoj frue forlasas la lernejon, antaŭ ol ili povas evoluigi la proprajn lertojn aŭ pretigi sin por karieroj.*

*Je la sama tempo, UEA rekonas kaj honoras la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revivigo, kaj por ŝirmi la endoman sferon kontraŭ subpremo kaj diskriminacio. Tiaj iniciatoj formas esencan parton de la strebado starigi mondon kie multaj kulturoj kaj lingvoj povu harmonie kunekzisti – temo speciale grava en la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kaj aparte grava por nia Asocio kiu laboras por lingva egaleco.*

*Sekve, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj kaj krei daŭripovan estontecon kiam ĉiuj homoj traktiĝas kun egala atento kaj respekto, sendepende de lingvo, kulturo, genro, kaj aliaj formoj de diverseco.*

## **UEA asistas por traduki la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj en Usonan Gestolingvon**

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu lastatempe (10 decembro 2018) festis sian 70-an datrevenon, estas inter la plej tradukataj dokumentoj en la mondo. kaj certe unu el la plej gravaj. Laŭ la Oficejo de la Alta Komisionestro pri Homaj Rajtoj, la dokumento haveblas en 518 diversaj tradukoj en formato HTML kaj/aŭ PDF – ekde la abkaza ĝis la zulia. Inter la lastatempaj aldonoj estas Usona Gestolingvo (ASL): vidu <https://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/UDHRinsignlanguages.aspx>.

La traduko en ASL estis aldonita rezulte de interveno de UEA, kunlabore kun la Usona Lernejo por Surduloj (American School for the Deaf), en Hartford, Usono. Tiu lernejo, fondita en la jaro 1817, estis la naskiĝloko de ASL (American Sign Language). ASL estas tute alia

ol Brita Gestolingvo kaj precipe similas la Francan Gestolingvon, de kiu ĝi deriviĝis.

Gestolingvoj, kontraste al signitaj lingvoj, estas kompletaj kaj sendependaj lingvoj – sendependaj de la dominaj lingvoj parolataj en la regionoj kie ili estas uzataj. Ili montras plenan gamon de gramatiko, sintakso kaj leksikaj elementoj kiel troviĝas en parolataj lingvoj.

La Universala Deklaracio estas havebla en Esperanto, en traduko kreita en la fruaj 1950-aj jaroj de teamo kies membroj estis, inter aliaj, Ralph Harry, poste ambasadoro de Aŭstralio al UN, kaj Ivo Lapenna, profesoro de internacia juro kaj poste prezidanto de UEA. Vidu: <https://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=1115> . La retejo de la Alta Komisionestro notas, ke, "Nia celo estas disdividi la Universala Deklaracion kun la tuta mondo, kaj ĉiu homo estas bonvena kontribui novan tradukon en lingvo kiu ne jam troviĝas en la kolekto."

## **Feliĉan naskiĝtagon, Sir Brian! UEA salutas Sir Brian Urquhart okaze de lia centa naskiĝtago**

En 1991 Universala Esperanto-Asocio aljuĝis al Brian Urquhart sian Zamenhof-Premion rekone al liaj multaj jaroj de servado al Unuiĝintaj Nacioj. La 28-an de februaro ĵusan, li festis sian 100-an datrevenon, akompanate de koruso de laŭdoj de internaciaj funkciuloj kaj pacfarantoj tra la tuta mondo. Sir Brian estis tie ekde la komenco – kiam Unuiĝintaj Nacioj ekestiĝis – kaj, kiel atentigis la Ĝenerala

Sekretario de UN António Guterres en sia festa saluto, "Li establis la normon por la internacia civila servo: normon de principoj, sindediĉo kaj senpartieco." Sir Brian rolis kiel asistanto de Ĝenerala Sekretario Dag Hammarskjöld kaj proksime laboris kun Ralph Bunche por establi la rolon de UN en internacia pacfarado – laboro kiun UEA aparte rekonis per sia Premio Zamenhof.

Inter aliaj ricevantoj de la Premio Zamenhof estis James Grant, Direktoro de UNICEF, Marti Ahtisaari, Prezidento de Finnlando, kaj Amadou Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de Unesko.

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.*

*212-687-7041*

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041